# Komunikoj

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

JARO 34-a | JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO | N-ro 139 2010


**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

## ELDONEJO LORENZ KAJ LA KUBA UNIVERSALA KONGRESO



Prelegas Paulo S. Viana

Almanako Lorenz kontentigas kuban samideanon

Dum la Movada Foiro, en la sabato antaŭ la oficiala malfermo de la 95ª Universala Kongreso en Havano/Kubo, kaj dum la sekvaj tagoj, la Estraro de Eldonejo Lorenz intense informis la kongresanojn pri la kunsido de la Eldonejo, kiu okazos marde, la 20-an de julio. Ĉie oni povis vidi la belan kartonan afiŝeton kun la bildoj de Jesuo, Kardec kaj Zamenhof, kaj verŝajne preskaŭ ĉiu kongresano ĝin ricevis.

Rezultis de tiu kompetenta laboro, ke la ĉambron 'Lapenna' preskaŭ plenplenigis interesatoj – ĉirkaŭ naŭdeko da gesamideanoj el multaj landoj, kiuj atente akompanis la programeron. Surprize, alvenis la estro de la Kuba Asocio de Spiritismaj Asocioj, S-ro Alfredo Duran, kiu salutis en la hispana, kaj informis, ke en Kubo funkcias 450 spiritismaj centroj oficiale registritaj, kio faras tiun landon la dua kun plej granda nombro de spiritistoj en la mondo (post Brazilo). Post preĝo, samideano Álvaro Motta montris kelkajn bildojn de la kubaj pioniroj en la spiritisma loka movado kaj João Santos informis pri la agado de nia Eldonejo.

Sekvis duonhora prelego de Paulo S. Viana pri la temo "Ĉu mia konscienco anesteziĝis?". Oni povas resumi la enhavon de tiu prelego per tio, ke veran kristanan respondecon ĉiuj homoj havas, en la senco, ke ankoraŭ granda kvanto da kunhomoj suferas mizeron en la mondo, kaj ke neniu el ni rajtas ignori tian amasan suferegon. La preleganto starigis la demandon "Ĉu la homo estas esence bona, aŭ esence malbona, laŭ la spiritisma doktrino?" Li finis sian prezenton per rapida komparado inter la interna ideo de Esperanto (esprimita per la fama poemo 'Preĝo sub la Verda Standardo') kaj la instruoj de la Spiritoj, kodigitaj de Allan Kardec. Post la prelego, pluraj ĉeestantoj kontaktis la anojn de Eldonejo Lorenz por ricevi la resumon de la prelego kaj la montritajn bildojn.

Finiĝis la kunsido en gaja etoso, per lotumado de spiritismaj libroj kaj sentoplena preĝo. Restis al la ĉeestintoj kaj organizintoj nenia dubo, ke ekzistas granda interesiĝo de la internacia esperantista publiko pri la spiritismaj ideoj. ★

# ELDONEJO LORENZ ĈEESTAS LA 66-AN INTERNACIAN JUNULARAN KONGRESON EN KUBO

*Raportaĵo de Alvaro Motta*

La 30-an de Julio Eldonejo Lorenz okazigis en Villa Tropico, Kubo, dum la IJK, diskutrondon pri la temo "Kio estas Spiritismo?" La celo de tiu neformala renkontiĝo estis prezenti kelkajn gravajn kaj bazajn konceptojn rilate al la Spiritisma Doktrino. En Kubo, nuntempe, ekfloras pluraj religioj kaj ekzistas granda konfuzo inter la Spiritisma Doktrino kaj aliaj afrikdevenaj religioj. Tiu renkontiĝo estis bona okazo por klarigi la ĝustan sencon de la vorto "Spiritismo", laŭ instruo de la superaj spiritoj al Allan Kardec. Ĉiu partoprenanto ricevis la jenajn flugfoliojn: "Konatiĝu kun Spiritismo" (prezentas en konciza maniero la ĉefajn punktojn de la Spiritisma Doktrino), "Hejma Studado de la Evangelio" (klarigas kiel kaj kial oni devas praktiki la Evangelion hejme), "La Misio de Esperanto" (letero de la spirito Emmanuel, mediume skribita pere de Chico Xavier (Sxiko Sxavier), kie li klarigas la gravecon de Esperanto en la spirita mondo), kaj la lastan numeron de "Komunikoj". La partoprenantoj ankaŭ ricevis Almanakojn Lorenz 2010, kiuj estis tre valoraj, precipe por kubanoj, ĉar importado de libroj estas afero treege kosta por ili. Indas mencii, ke antaŭ pluraj jaroj, Eldonejo Lorenz dissendas, senpage, Spiritismajn librojn al kubaj esperantistoj. Estis afero treege kortuŝa aŭdi, ke tiuj libroj multe helpis ilian vivon kaj ke ili sentas sin vere dankemaj pro tio. Tiu laboro estas ja grava, ĉar por firma kaj solida kreskado de Spiritismo en Kubo, estas nepre necese ke kubanoj havu aliron al la bazaj verkoj de la Spiritisma Doktrino. Ĉefe kiam oni konstatas ke tiu bela insulo staras hodiaŭ, kiel la dua plej spiritisma lando en la mondo*. Mi, kompreneble, ne povas forgesi mencii pri la ĝojo, la simpatio kaj la entuziasmo de la kubanoj. Tie oni facile rimarkas grandajn similecojn inter la kuba popolo kaj la brazilanoj, ĉu en la kulturo, ĉu en la mikseco de etnioj, ĉu en la muziko. Mi certe povas diri, ke la kuba popolo eterne restos en la koro de la brazilaj esperantistoj. ★




Alvaro prelegas pri Spiritismo

* Doktorino Marlene Nobre, "Cuba, the world's second most spiritist country", International Medical Spiritist Association (http://www.ameinternational.org)

## EL LA ARKIVOJ DE NIA ELDONEJO

Pacon, pacon, pacon! Ĝin ni nepre bezonas en nia Spirito, por ĝui la feliĉon, kiun Dio rezervis por ni. Ni ĝin bezonas en nia hejmo, por starigi amon inter niaj familianoj. Ĝin ni bezonas en la mondo, por la progreso de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj popoloj. Kompreneble ĝi venas de Dio, kiu ĝin donacas al ni. Sed, samtempe, ni ĉiuj devas starigi, unue en nia Spirito, due en la ĉirkaŭaĵo, kie ni vivas. Por starigi pacon ni nepre devas starigi amon en nia koro, kaj sekve pardonon al ĉiuj, kun kiuj ni kunvivas en la hejmo, en la familio, en la laborejo, ĉie.

Ni ankaŭ povas helpi niajn fratojn krei pacon en si kaj ĉirkaŭ si, per nia penso. Ni ĉiam pensu pri paco, kaj ĉiam deziru pacon al proksimulo. Penso estas forto, kaj ĝi iom post iom efikas. Pacon al vi! ★

23/2/1992

Mediumo: Délio Pereira de Souza
Spirito: Esperantisto

La suba poemo estis tradukita el la portugala lingvo de F.V. Lorenz, la 15-an de junio 1951, kiam li ankoraŭ loĝis en Dom Feliciano, Rio Grande do Sul.

### AVE BENDITA

Ave Bendita, Mãe de Jesus Cristo,
Mulher Divina, que nos faz orar,
Cheia de Graça, por Deus a conjugar,
De Cristo-Verbo, o excelso Verbo-Amar.

Chorando a dor do Filho à cruz pregado,
De lágrimas tecendo seu Sudário,
Maria é a Cruz de carne do Calvário,
Um coração de Mãe crucificado.



### MARIA

Mi Vin salutas, de Jesu' Patrino,
Dia Virin', kaj preĝas mi laŭ Vi,
Gracplena, kun esper' ke Am' de Di'
Nin benos pro la Am-konjugaci'.

Plorigis Vin de l' Fil' sur kruc' doloro,
Morttukon al Li teksis manoj Viaj,
Maria, karna kruc' de l' mensoj piaj,
Patrina krucumita, para koro!

Dom Feliciano, Rio Grande do Sul, la 8an de Julio 1951[a]

Al Sr[o] Dr[o] Carlos Domingues,

Ŝatinda Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo

Tre estimata Samideano kaj Amiko:

Elkorajn salutojn.

Mi informas Vin ke mi ricevis Vian afablan leteron de la 16a de Majo, kaj post kelkaj tagoj la naŭ foliojn, enhavantajn 23 novajn poeziaĵojn; ni tuj komencis traduki ilin, kaj hodiaŭ mi sendas al Vi la tradukojn.

Ankaŭ mi dankas pro la salutoj, kiuj akompanis la leteron, al mi senditan de la samideano, sr[o] Liberal Francisco Carpini el Araras; mi respondis ankaŭ hodiaŭ lian leteron.

Dezirante al Vi ĉiam saluton kaj prosperadon, mi restas Via dankema samideano.

Lorenz


**ĈU VI VOLAS HELPI?** Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo trege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj.

Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo.

Dio benu vin!


Editora_lorenz@uol.com.br • Tel. (21) 2221-2269


# • • • • LANĈOJ DE LORENZ • • • •




**AIDOSO,**
**EGE TRANS LA DOLORO**
**R$10,00**

**INTERCONEXÃO**
**Aprendendo sobre o Espírito – Vol. VIII**
**R$22,00**








## KIO ESTAS SPIRITISMO?

Pluraj personoj ankoraŭ konfuzas la Spiritisman Doktrinon kun aliaj religioj kiuj praktikas mediumecon. Celante klarigi tion, Brazila Esperantista Federacio, ekde 1996, eldonas kaj senpage disdonas la jenajn faldfoliojn: “Conheça o Espiritismo” (Konatiĝu kun Spiritismo) kaj “Divulgue o Espiritismo”, (Disvastigu Spiritismon), kiuj nur en Brazilo atingis la eldonkvanton de 500 mil ekzempleroj.

Ĉi tiuj faldfolioj, ankaŭ aprobitaj de Internacia Spiritisma Konsilantaro, jam estis tradukitaj en 18 idiomojn kaj povas esti presitaj el la retpaĝo de la Konsilantaro: **www.spiritist.org**

(SEI/136)


Said inter la filoj

## AMIKOJ DE NIA ELDONEJO

Said Nami, el Irano, estas tre kara Amiko kaj Frato de nia Eldonejo.

Said, nome de Eldonejo Lorenz, ni vin gratulas pro via energia laborado por nia kara Lingvo!

Pacon en via bona koro!




**Ĉi tiu verko celas proponi skeman ideon pri la regionoj, kie okazas interŝanĝoj inter la spirita kaj la materia mondoj de difinita estulo, tio estas, inter la profunda psikismo kaj tiu surfaca.**

**Se vi, kara samideano, ekster Brazilo, deziros ĝin ricevi, en la komforto de via hejmo, tute senpage, skribu kaj ni tuj ĝin sendos al vi.**

**Editora_lorenz@uol.com.br**

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**
Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903
Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970
Rio de Janeiro (Brasil)
Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>